

Zpravodaj

SEKCE MLÁDEŽE ČESKOSLOVENSKÉHO ESPERANTSKOHO VÝBOTU

ročník III.

1/68

BUDE OPRAVDU HISTORICKÁ ?

Vážení přátelé,

jak již ze samého nadpisu tohoto úvodního článku vyplývá, existuje určitý důvod k pochybnostem. Příčinou je malý počet přihlášených delegátů a ostatních účastníků. Sdělení, které nám postlal před dvěma dny náš krajský zástupce pro Jihomoravský kraj, Jiří Kolečka z Brna (Merhautova 71, Brno) není právě v tomto ohledu povzbuzující. Na jedné straně je zajištěno ubytování, sál pro jednání konference, kulturní večer s programem a tancem atd., na druhé straně minimální počet přihlášených účastníků. Není to trochu divné?

Snad si ne všichni uvědomili, jak důležitá je v tomto okamžiku zejména osobní účast většiny mladých esperantistů, členů sekce mládeže, na jednání celostátní konference, která byla právě z důvodů co nejširší účasti svolána do Brna, které je nejnázne přístupné všem mladých z Čech, Moravy a Slovenska.

Myslíme si, že program konference bude zajímat všechny, kteří s očekáváním sledují vliv demokratizačního procesu v naší zemi na celé esperantské hnutí. Projednání otázek nového organizačního uspořádání mládežnického esperantského hnutí v ČSSR, jeho vnitřních i vnějších vztahů, finančního zajištění a v neposlední řadě i jeho celkové koncepce činnosti, budou vyžadovat pozornost a spolupráci většího počtu členů, než je stav dosud přihlášených na konferenci.

Prosíme proto všechny, kteří se dodatečně rozhodnou vyjádřit svoji příslušnost k mládežnickému esperantskému hnutí účastí na celostátní konferenci, aby přijeli v sobotu dne 25.5. t. r. do Brna (Juranův dům, tř. Říjnové revoluce 18), kde v 8.30 hodin zahájíme naše jednání.

Předpokládaný program je tento:

pátek, 24.5.68: příjezdy účastníků konference, služba v informační kanceláři na nádraží až do 23.00 hod (zde se obdrží materiály, plánek města, stravenky a ubytovací poukazy)

sobota, 25.5.68: 8.30 hod - jednání 4. celostátní konference

(v poledne přestávka na oběd), 19.30 EK Brno - čtyři krátké esperantské scény polských autorů, od 21.00 "MINIČARDO" = k poslechu a tanci hraje profesionální cimbálová hudba

neděle, 26.5.68: podle zájmů - společný odjezd vlakem do Blanska-Macochy, Punkevní jeskyně, propast Macocha s návratem kolem poledne. Pro ty, kteří se neúčastní výletu, je připravena procházka Brnem (hrad, stará radnice, katedrála atd.)

V konferenčním sále bude možno uspořádat výměnnou burzu esperantského materiálu.

Delegáti a účastníci obdrží ještě před zahájením hlavní body pracovní části konference písemně, aby mohli zasvěceně diskutovat k předloženým návrhům.

Jménem výboru Sekce mládeže ČSEV Vás všechny ještě jednou přátelsky zvu a těším se s Vámi v Brně na shledanou.

Mikuláš Nevan

KONSILOJ POR ORGANIZADO DE LOKAJ JUNULRAJ GRPOJ

Tio ĉi estas resumo de artikolo aperinta en "Perspektivo", la oficiala organo de Argentina Esperantista Junulara Organizo:

- 1) Ne fondu grupon, se ne ekzistas minimume 5 junuloj.
- 2) La maksimuma aĝo de la membroj devas esti 30 jaroj.
- 3) Se vi estas izola, aŭ se vi estas malpli el 5 junuloj, starigu kursojn, kaj per ili varbu aliajn anojn. (Eĉ se ekzistas pli da membroj, organizu kursojn! Ne forgesu, ke la ĉefa celo de nia movado estas disvastigi la lingvon.)
- 4) La estraro de la grupo povas konsisti el 3 postenoj: Prezidanto, Setkretario kaj Kasisto. Krome, povas ekzisti kunlaborantoj por diversaj fakoj (Koresponda Servo, Muzika Servo, Magnetofona Servo ktp.) Sed, antaŭ ĉio, evitu burokracion, kaj memoru: postenoj ne sufiĉas, oni devas labori. . .
- 5) La grupo devas agi sur 3 kampoj samtempe: la informado, la instruado kaj la interna vivo.
- 6) Pri la informado, la junulara grupo devas kunlabori kun la informa fakoj de la loka grupo, se tia ekzistas. Se ĝi ne ekzistas, la junulara grupo devas krei sian propran informo-fakon, kies ĉefa celo estas sendi informojn pri la progreso de la Esperanto-Movado en la mondo al la gazetaro kaj ĝenerala publiko.
- 7) Certa parto de informado devas rilati ankaŭ NEJO-jn (Ne-Esperantistaj Junular-Organizoj). Oni profitu vizitojn de NEJO-jn por fari informan prelegon pri la lingva problemoj kaj Esperanto. Se eble, vi eĉ povas proponi la starigon de E-kurso tie.
- 8) Pri la instruado: se ne ekzistas loka grupo en via urbo, la junulara grupo nepre devas starigi elementem E-kurson, almenaŭ unufoje jare. En la kursoj NENIAM forgesu motivi la instruadon, t.e. stimuli la lernantojn, vekti ilian intereson.
- 9) Pri la interna vivo: fondite, la junulara grupo devas okazigi almenaŭ unu kunvenon ĉiusemajne. En ili, ĈIUJ KLOPODU PAROLI NUR ESPERANTE. Unufoje monate, ĉiam en la sama tago, al kutimiĝu fari tre varian kunvenon, kun prelegeto, diskuto pri esperantaj kaj neesperantaj temoj, deklamo, muziko, esperanta testo kun disdono de libroj, ktp. En la dua parto de tiu kunveno, vi okazigu, se eble, dancvesperon. En la aliaj semajnaj kunvenoj, vi povas komisi la plej lertan el via grupo por gvidi perfektigan kurson.
- 10) Apartaj sugestoj:
 - a, instigu ĉiujn anojn de la junulara grupo:
 - I/ aboni esperantaj gazetoj (kaj naciajn kaj internaciajn);
 - II/ korespondi kun eksterlandanoj (utiligi la korespondservon);

- III/ legi E-librojn kaj aŭskulti E-radiclesendojn;
- IV/ organizi vojaĝojn, eksterlanden;
- b, partoprenu kulturajn vesperojn organizitajn de lokaj E-grupoj
- c, ĉeestu diversajn E-renkontiĝojn kaj kunvenojn.

(PERSPEKTIVO N-ro 8/68)

Por interesiĝantoj pri la gazeto DIA REGNO

Fondita en la jaro 1908 ĝi aperas regule ĉiumonate en Nederlando. La gazeto estas oficiala organo de Katolika Esperanta Ligo Internacia (KELI), kaj ĝia celo estas:

KREI EFIKAN KONTAKTON INTER KRISTANOJ EL DIVERSAJ LANDOJ KAJ PER ESPERANTO DISKONIGI LA EVANGELION PRI JESUO KRISTO)

Interesantoj povas mendi la gazeton per jara abonpago 30,- Kčs, en kiu estas enkalkulita ankaŭ membreco de KELI:

Prof. Dr. Rudolf HORSKÝ, Praha Spořilov, VII. Jihovýchodní 945

O jedné umělé řeči

byl název malé zprávičky ve Svobodném Slově dne 12.5. t.r. Jde o propagaci normalizované řeči mezinárodních slov Interlingue. Aktivní kolektiv čs. interlingvistů má sídlo v Jablonci nad Nisou. Jak lze tuto řeč použít? Podle slov příznivců interlingue prý tato řeč poskytuje základní jazykovou předvýchovu pro studium kterékoli řeči, doplňuje a zvyšuje kvalifikaci, je možné se s touto řečí domluvit takřka v celém světě. Uplatnila se na mnoha výstavách, dokonce bylo do ní přeloženo několik českých knih. Mezinárodní řeči normalizovaných slov je možné se při troše snahy naučit za půl roku.

Toliko novinový článek. Třebaže nevíme, nakolik jsou interlingvisté početní a jaká je jejich organizace ve světě, soudíme, že jsou velmi agilní v získávání nových zájemců a členů. Nevidíme v nich naši konkurenci a ani je nezamítáme jako bezvýznamné propagátory něčeho, co nemá budoucnost. Jejich práce zjevně nepostrádá solidnost. Autor tohoto příspěvku si vyžádal některé materiály a hodlá s nimi navázat rozhovor. Jestliže se debata uskuteční, uveřejníme další podrobnosti v některém z příštích čísel.

Bohumil Slezák

Začátkem roku požádal Esperantský kroužek mladých v Chomutově předsedu naší sekce Mikuláše Nevana, aby uspořádal a přednesl přednášku o esperantu pro širší veřejnost. Vše bylo organizačně připraveno, včetně vydání malých plakátků, a tak 26. 1. t.r. vyjelo 5 členů vedení sekce do Chomutova. Mladý pražský esperantista Josef Slezák totiž ochotně zapůjčil svůj vůz i řidičské umění. Cesta byla nanejvýš dramatická. Několikrát se muselo úplně zastavit pro silnou vichřici, na některých místech se jelo doslova podél telefonních sloupů a protože zamrzl stírač, nebylo vidět ani na předek motoru. Naštěstí se počasí rychle měnilo a deset minut před ohlášeným začátkem přednášky byli všichni na místě. Horší to bylo s účastí místních. Více než nových zájemců přišlo esperantistů z města i okolí a tak se brzy stočila řeč na

současné problémy našeho hnutí. Zajímavá diskuse přinesla náměty pro delší oživení esperantského hnutí v Severočeském kraji. Na závěr byl promítnut barevný film o Jugoslávii s esperantským komentářem. V přednáškovém sále byla rovněž instalována výstavka esperantských knih, časopisů a bohaté korespondence s členů kroužku.

Lze si jenom přát, aby i v ostatních mládežnických esperantstrých kroužcích a skupinách se někdo chopil podobné akce jako Jaroslav Suchánek v Chomutově.

-bs-

TARRAGONA PREPARIĜAS POR LA KONGRESO DE TEJO

Junaj esperantistoj en hispana urbo Tarragona estas nune multe okupataj. Ili preparas sin por gastigi la 2ĉ-an Internacian Junularan Kongreson de TEJO (27.7.-3.8.68). La kongreso, kiu la unuan fojon okazos en Hispanujo, atendas pli ol 200 da junesperantistoj el tuta Eŭropo kaj eĉ ekster tiu kontinento. Oni loĝos en studenta domo de la Universitato de Tarragona, kune manĝos kaj kune ankaŭ partoprenos varian programon (ekskursoj, prelegoj, kulturaj kaj turismaj aranĝoj, balo, ktp.). Detalojn liveras eksterlanda fake de JS ĈSEV.

UNIVERSALA DEKLARACIO DE HOMAJ RAJTOJ — 1968 JARO DE HOMRAJTOJ

Antaŭkonsideroj

Pro tio, ke agnosko de la esenca digno kaj de la egalaj kaj nefordoneblaj rajtoj de ĉiuj nombroj de la homara familio estas la fundamento de libero, justo kaj paco en la mondo,

Pro tio, ke malagnoske kaj malestimo de la homaj rajtoj rezultigis barbarajn agojn, kiuj forte ofendis la konsciencon de la homaro, kaj ke la efektivigo de tia mondo, en kiu la homoj ĝuos liberecon de parolo kaj de kredo kaj liberiĝon el timo kaj bezono, estas proklamita kiel la plej alta aspiro de ordinaraj homoj.

Pro tio, ke nepre necesas, se la homoj ne estu devigitaj, sen alia elektebla vojo, ribeli kontraŭ tiranismo kaj subpremo, ke la homaj rajtoj estu protektataj de la leĝo,

Pro tio, ke nepre necesas evoluigi amikajn rilatojn inter la nacioj,

Pro tio, ke la popoloj de Unuiĝintaj Nacioj en la Ĉarto reasertis sian firman kredon je la fundamentaj homaj rajtoj, je la digno kaj valoro de la homa personeco kaj je la egalaj rajtoj de viroj kaj virinoj, kaj firme decidis antaŭenigi socian progreson kaj pli altnivelan vivon en pli granda libereco,

Pro tio, ke la Ŝtatoj-Membroj sin devigis atingi, en kunlaboro kun Unuiĝintaj Nacioj, la antaŭenigon de universala respekto al kaj observado de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj,

Pro tio, ke komuna kompreno pri tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj estas esence grava por

plena realigo de tiu sindevigo,

Tial, Nun,

LA ĜENERALA ASEMBLEO

proklamas

TIUN ĈI UNIVERSALAN DEKLARACION DE HOMAJ RAJTOJ kiel komunan celon de atingo por ĉiuj popoloj kaj ĉiuj nacioj, por tio, ke ĉiu individuo kaj ĉiu organo de la socio, konstante atentante ĉi tiun Deklaracion, per instruado kaj edukado strebu al respektigo de tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj, kaj per laŭgradaj paŝoj naciaj kaj internaciaj certigu ilian universalan kaj efektivan agnoskon kaj observadon, same tiel inter la popoloj de la Ŝtatoj-Membroj mem, kiel inter la popoloj de teritorioj sub ilia jurisdikcio.

Artikolo 1. Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digmo kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj konsciencon, kaj devus konduti unu al alia en spirito de frateco.

Artikolo 2. Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen kiu ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato.

Plie, nenia diferencigo estu farata surbaze de la politika, jurisdikcia aŭ internacia pozicio de la lando aŭ teritorio, al kiu apartenas la koncerna persono, senkonsidere ĉu ĝi estas sendependa, sub kuratoreco, ne-sinreganta aŭ sub kia ajn alia limigo de la suvereneco.

Artikolo 3. Ĉiu havas la rajtojn je vivo, libereco kaj persona sekureco.

Artikolo 4. Neniu estu tenata en sklaveco aŭ servuteco; sklaveco kaj sklav-komerco estu malpermesitaj en ĉiuj siaj formoj.

Artikolo 5. Neniu suferu torturon aŭ kruelan, nehoman aŭ sendignigan traktadon aŭ punon.

Artikolo 6. Ĉiu rajtas esti ĉie agnoskita jure kiel persono.

(daŭrigota en venonta numero)

KIEL MALVENKIGI ESPERANTON

(La verdstela metodo)

Sub la titolo "KIEL MALVENKIGI ESPERANTON" aperis en Okcidentgermana Revuo artikolo, kiu satirstile montras, kiel oni povsa malutili al Esperanto.

Se oni volas malvenkigi la Internacian Lingvon (kaj mi estas certa, ke multaj el miaj gelegantej tion volas, senkonsidere pro kiaj kaŭzoj), do oni nepre devas ĉiamaniere ridindigi kaj kompromiti la Esperanto-movadon. Por tion fari ekzistas diversaj ebloj, sed unikan helpon en tio ofertas la simbolo de tiu movado – la verda

stelo. Se vi bone pripensas la aferon, vi certe konsentos al mi: La verda stelo estas kiel iu tipo de kemiaĵoj: Modera dozo efikas kiel medikamento, sed tro forta uzado estas venena. Ja, kelkfoje la verda stelo estas verda veneno - por mortigi ĉian estimon kaj respekton por Esperanto.

Por veni al praktikaj konkludoj: Se vi volas ridindigi Esperaton kaj senvalorigi ties insignon, tiukaze donu la verdan stelon al ĉiu persono, kiu iam komencis lerneti la lingvon. Estos tre bona malpropagando, se iu volas aŭdi de tiuj personoj iun frazon en la tutmonda lingvo, kaj lin renkontas absoluta nescio de tiu verda idiomo. Tamen, ne estu ekstremisma: Almenaŭ du frazetojn devus scii ĉiu portanto de verda stelo: "Bonan tagon, samideano!" kaj "Ĝis revido, samideano!"

Ekzistas alia bona maniero mise uzi la verdan stelon: Oni ornamu per ĝi la kunvenejon de la grupo aŭ klubo, ĉefe dum Zamenhofaj festoj kaj simile. Iam mi ĉeestis feston de grupo, kiu sukcesis ornamu la muron de sia salono per 13 gigantaj verdaj steloj (tre mallerte tranĉitaj el kolora papero). Tio ĝis nun estas absoluta rekordo. Kiu grupo sukcesos superi ĝin? Sciu, ke tio faras tre bonan malfavoran impreson: Se neesperantano envenas tian salonon, li tuj estas kaptita de malagrabra senrto; li iel suspektos, ke jen kunvenas la sekto de steladorantoj aŭ iu sekreta mistika esotera rondo. Krome tia amasiĝo de verdaj steloj tre taŭgas por detruigi respekton antaŭ nia afero ĉe oficialaj reprezentantoj de kulturaj instancoj, gazetaj raportistoj, gimnaziaj profesoroj kaj aliaj malŝatindaj personoj.

Tre bone ankaŭ taŭgas la stele sur verda flago. Ekzemplo, dum iu kunveno, renkontiĝo aŭ kongreso, oni nepre metu tian flagon sur la oratoran katedron, fiksi ĝin plue sur la frontmuro de la salono, kaj (se oni feliĉe posedas tiom da flagoj) ankaŭ sur la aliaj muroj. Nespertaj vizitantoj tiel tuj povas suspekti, ke jen kunvenas iu radikala fanatika movado, kiu elmontras sian adoratan emblemon, kiel ekz. faŝistoj, komunistoj, naŭistoj ktp. Kaj se tiuj vizitantoj ekmalŝatas la Esperanto-movadon: Jen nia celo jam estas atingita.

Ekzistas ankoraŭ multaj taŭgaj vojoj por (mis)uzi la verdan stelon. Tuj aĉetu kaŭĉukan stampilon kaj stampu la stelon sur viaj leterkovertoj! Sed ne nur unu stelon, mi petas, sed minimume kvin. Plej bone estas stampi la stelon sur leterojn aŭ poŝtkartojn al neesperantistoj. Kara sinjoro, ĉu vi jam portas kolĉenon kun tiu sankta signo? Ja, antaŭ dudek jaroj la junularo ankoraŭ estis progresema: Tiam iu germana grupo venis el kongreso junulara, kaj ĉiuj portis saman verdan ĉapeton kun blanka rondo enmeze, kiu siavice enhavis la amatan stelon. Al la hodiaŭa junulara esperanta tute mankas tia entuziasmo!) Se vi posedas aŭton, vi ja certe scias kaj konscias, ke unu modesta steleto estas tre malmulte. Ho, sur ĉiu flanko, pordo kaj fenestro de via veturilo devas esti minimume unu ĝis du belaj grandaj, tuj videblaj steloj.

Karaj gesamideanoj! Havu fantazion! Pripensu mem, kien vi ankoraŭ povas meti la verdan stelon! Memoru la alvokon de Raymond Schwartz, laŭ kiu la verda stelo estu "en butontru', en nazotru', en trulala kaj tiel plu. . .".

Sur ĉiuj niaj libroj, revuoj, broŝuroj, faldfolioj, kongresanaro-adresaroj, glumarkoj, kotiz-kvitancoj, kunven-invitoj, kurslecionaroj, kongres-aliĝiloj ktp. ktp. ktp. - ĉie devas esti nia kara verda stelo. Sen tiu stelo nia lingvo ne povas okzisti! Kaj bone

sciu: Sen troa uzo de tiu stelo ni neniam sukcesos sufiĉe ridindigi nian aferon. Ek al laboro!

Kion vi respondas, kara leganto? Vi nur posedas unu malgrandan modestan stelinsignon? Vi ne scias, kiel alie uzi nian gloran emblemon? Hontu, hontu! Kaj por ke venu al vi novaj ideoj, ĉiun vesperon mallaŭte preĝu antaŭ enlitiĝo la belan poemon de nia fama kaj elstara poetino Marie Hankel:

"La bela verda stelo / Kviete briles jen / Ĝi estas alta celo / Allogas nin kien? // Steleto kara mia / Kion do volas vi? La brila lumo via / Kion alportas ĝi. . ." Kaj certe dum la songo venos al vi novaj ideoj, kiamaniere misuzadi la verdan stelon, por ke finfine malvenku la Internacia Lingvo.

Kanguruo

KALEIDOSKOP ZPRÁV, ZAJÍMAVOSTÍ A INFORMACÍ

Kulturní večer u příležitosti Týdne Mezinárodního přátelství v Plzni připravuje esperantská skupina ZDŠ v Mělníku u Prahy; datum: 21.6.1968.

Esperantskou pohlednici vydal EK v Ostravě k výstavě "OSTRAVA '68".

Tisková oprava: v čísle 5-6/67 došlo na str. 1 k dvěma chybám u odpovědi M. Drašnarové. Správně má být . . . kaj kredas, ke ĝi fine. . .
. . . por niaj legantoj. Omlouváme se autorce odpovědi i čtenářům.

Vyšly ZPRÁVY ČSEV, posl. číslo roč. 67. První letošní číslo je již v tiskárně.

Vlastní rozmnožovaná krajská zpravodajství již vydávají někteří delegáti-členové výboru naší sekce. Obdrželi jsem např. ukázkou z Východoslovenského, Severočeského, Středočeského a Východočeského kraje.

Nedostatek přispívatelů-dopisovatelů velmi ztěžuje činnost redakčního kolektivu Zpravodaje. Napište nám!

Výsledky přeregistrace esperantských kroužků a klubů ČSSR v číslech: (podle stavu ke dni 16.5.68) celkem EK . . . 120, z toho na Slov.: 24 počet členů, celkem 3. 441, z toho na Slovensku 477.

Mapa světa poprvé v esperantu byla vydána IOE. Dotaz na zástupce IOE pro Československo: Je možné si mapu u Vás objednat?

Upomínáme vrácení dotazníků centrální evidence čs. esperantistů, které Vám byly zaslány v minulém čísle Zpravodaje.

Rubriku zahraničních zájemců o korespondenci s našimi mladými esperantisty

zaĉneme uveřejňovat od příštího čísla.

Skautská esperantská liga se začíná podle dosud neověřených informací ustavovat v naší republice.

Situace v Polsku zabránila účasti našeho delegáta na mezinárodním studentském semináři STELO v Toruni. Pohraniční orgány vrátily našeho reprezentanta od hranic zpět. . .

ZPRAVODAJ SM ČSEV - orgán Sekce mládeže ČSEV

číslo 1/1968. Odpovědný redaktor Mikuláš Nevan. Adresa administrace: Ústředí mladých esperantistů SM ČSEV, Ječná 8, Praha 2. - Praha, květen 1968.

Karaj gesamideanoj.

KIAL VI LERNIS ESPERANTON?

Certe ne nur por interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn, por porti ĉiam insignon aŭ por originale pasigi tempon!

Sed vi lernis Esperanton

por - havi senperajn rilatojn kun samideanoj el la tuta mondo,

por - ekkoni opiniojn, pensojn, sopirojn kaj esperojn de alilandaj amikoj,

por - ekkogi kulturon kaj vivon de aliaj landoj,

por - antaŭenpuŝi ĉiujn fortojn, kiuj en la mondo luktas por paco, interkompreno kaj solidarsento inter ĉiuj homoj,

por - starigo de demokratio kaj paca kunvivado en la tuta mondo.

Se vi lernis Esperanton tiucele, vi nepre bezonas rimedon por kontakti samcelanojn ...

JEN HELPILO POR VI!

Kiel ligilon kaj esprimilon la junulfako de S.A.T. (Sennacieca Asocio Tutmonda) eldonas la gazeton

"La Juna Pensio".

LJP - aperas nur dank' al la kotizoj de siaj abonantoj; ĝin subvencias neniu ajn organizo.

LJP - estas verkata de la abonantoj mem kaj ne de kelkmembra redakcironde.

LJP - pridiskutas aktualajn temojn pri sociaj, junularaj, ekonomiaj, edukaj kaj kulturaj problemoj; ktp. Cenzuro ne ekzistas, neniu temo estas tabuo. Ĉiu rajtas esprimi libere sian propran opinion kaj eventuale rebati alies.

LJP - aperas stencilitforme akurate ĉiun duan monaton minimume 18-paĝa. Komence de 1968 ĝi jam atingis sian 58an numeron. De tempo al tempo aperas suplementoj senpagaj por la abonintaro. Ekzemple en la jaro 1968 aperas "Originala Kantareto".

LJP - vi povas uzi kiel taŭgan materialon por interesaj diskutoj dum kunvenoj.

LJP - estas uzebla kiel instruhelpilo por E-kursoj. Viaj gekursanoj povas en ĝi aperigi siajn unuajn artikolojn,

LJP - servas ankaŭ al izoluloj: ĉiun duan monaton ilin vizitas nova numero, kiu ligas ilin kun la tuta mondo.

